## LIBERPENSULA ANGULO

### Formoj kaj historio de l' Humanismo

La Humanismo pripensas la homon kaj ĝiajn eblojn. En tio ĝi faras ofte nekonscian diferencon inter homo kaj besto kaj juĝas la unuan pli alta, supera. Ĝi do estas homcentra. Ĉar ĝi emfazas la diferencon inter homo kaj besto, ĝi ofte neglektas la samecon kaj metas la homajn (= humanajn) agojn kontraŭe al la bestaj.

Pro tio ke la homo diferencas fakte en multaj kampoj de la animaloj kaj ke iu akcentas tiun, alia alian, ni povas distingi plurajn formojn de humanismo.

1. La homo ridas kaj ploras; tio formas la esencon de la homo **(H. Plesner)**.

2. La homo havas religion. Tion tre emfasa **Erasmo**. Ankaŭ la nuntempa personismo agnoskas **personan** Dion. **(Ph. Konstam)**.

3. La homo povas krei belaĵojn. Goethe estis estetika humanisto.

4. La homo agu home. Precipe ĉi tiun maksimon oni ofte identigas kun humanismo, kvankam estas nur unu formo el ĝi. Oni trovas ĝin jam de jarmiloj en Ĉinio. Ankaŭ **Sokrato** estis etika humanisto.

5. Reprezentinto de la juna humanismo estas **Hugo de Groot (Grotius)**.

6. Scienco kaj precipe tekniko estas preskaŭ tute humanistaj, ĉar ili ĉiam eliras de la homo. **(Koperniko, Darvin, Freŭd)**.

7. Se oni tro emfazas la intelektan diferencon inter homo kaj besto kaj vivas per la graco de la **racio**, oni estas racia humanisto. (Racionalismo, **Dekart**).

8. En aparta fako de la filozofio (noetiko) oni faras la racion studobjekto. Laŭ A. Comte la homo scias nur tion, kion ĝi mem perceptas. Tiun formon de humanismo oni nomas pozitivismo, kies plej ekstrema adepto **(W. James)** baptis sian sistemon humanismo.

9. Tiuj politikaj partioj, kiuj deziras akiri indan vivon por la individuo, estas humanistaj **(Socialismo, Liberalismo)**.

10. La psika monismo estas ekzemplo de metafizika humanismo **(Fehner)**.

11. La termino humanismo estas unuafoje uzata en la pedagogi-scienca kampo de **F. J. Nithamer** (1808). Ekstrema reprezentantino estas **Montesori.**

Eble mi forgesis mencii formojn de humanismo, sed mi certe citis la plej gravajn. Oni povas esti humanisto en unu kampo kaj adepto de alia doktrino en alia. Tiel **W. James** estas humanisto noetika, neglektanta ĉiun dion, sed etike li denove kreas diajon. La liberpensuloj estas raciaj humanistoj, kaj diigante la racion ili neas la ekziston de religia realaĵo. **Montesori** ĉiam ankoraŭ estas anino de l' rom-katolika eklezio, kaj papo Benedikto XV benis ŝian metodon je 21.11.1918. Du kalvinanoj, instru-inspektoroj en Nederlando, skribis: „La granda abismo disiganta la pedagogojn estas tiu de la Ĉi-monda kaj Transmonda idealo. Ĉi tiu dilemo ne toleras neŭtralecon. Ankaŭ la katolika pedagogi-scienco konas tiun diferencon. Tial la katolika eklezio ne scias, kiel agi al sia fama, sed sendogma filino." Kaj ankaŭ „...Montesori-lernejo ne povas esti kristana, kaj same kristana lernejo ne povas esti inspirata de la ideoj de Montesori, — ĉar ŝia pedagogi-scienco estas antropocentra-humanisma-pagana." El supraj linioj legiĝas, ke la eklezio (ne nur la romkatolika) kaj ĉiuj aliaj sistemoj havantaj dogmojn, ne nur ne favoras la humanismon, sed eĉ instinkte abomenas ĝin. Tio ankoraŭ pliklariĝas, kiam ni studas la historion de l' humanismo.

Ĉi tiu komenciĝas kun la momento, en kiu la homo kapablas pensi pri si mem. Antaŭ ol ĝi ne povas distingi inter mio kaj ne-mio, la homo estas same kiel la besto, nur parto, de la ĉirkaŭaĵo. Samo okazas ĉe la etulo, kiam ĝi fariĝas proks. 3-jara. Ĉiu scias, ke la indivudo tiam travivas krizan tempon; la volo sin montras, la estaĵo formiĝas. Pri tiuj pratempoj ni scias tro malmulte por povi ĝin fruktodone konsideri.

La unuajn signojn pri humanismo en historia tempo ni trovas ĉe la grekoj. Ĉe tiu popolo la pensado ne nur estas ilo, sed fariĝas ankaŭ studobjekto. La homo komencas pensi pri sia pensado. La pioniro estas **Parmenido;** lin sekvis i.a. **Zenono, Heraklito, Sokrato.** Ankaŭ tiu epoko estas kriza, ĉar ĝi liveras al la homo la sciencon. **Leŭkipo** metis la fundamenton de l' atomteorio, **Demokrito** konstruis la unuan etaĝon sur ĝi.

Poste venis eminentaj filozofoj kun multa aŭtoritato **(Platono, Aristotelo)**. Ili ellaboris sistemon el la donitaĵoj de l' antaŭuloj. Tiam Grekio rezignis pri pluaj esploroj; la romanoj konkeris ĝin, transprenis la grekan sciencon kaj disvastigis ĝin tra Eŭropo. La kristana teologio bazas sin sur **Aristotelo.** Oni ne studas la efektivajn objektojn, sed instruas la ekzemplojn de La Filozofo („virino havas malpli da dentoj ol viro").

Tamen, kiam oni eltrovis kompason kaj poste Amerikon, kiam oni disponas pri bonaj teleskopoj, kiam oni akiris la aŭtentajn grekajn manuskriptojn, kiam oni inventis la pulvon, formalaperis la nobelaro, kiam sin levis urboj kaj burĝoj, tiam la nova klaso ne plu konsentis pri la tradiciaj veroj, sed mem deziris esplori. Tiun tempon oni ordinare nomas la Humanismo, ĉar ĝi reiras al la grekaj fontoj. Famaj filozofoj estas Francis BACON kaj Joh. **Locke.** Ili siavice preparis la francan revolucion, kiam denove sin levis parto de la eŭropa burĝaro. La francoj kreis la liberalismon kaj la materiismon, HELVETIUS, LA METTRIE, kaj disportis la ideojn pri libero, frateco kaj egaleco tra Eŭropo kaj Ameriko. En la lasta kontinento ĝi plej forte enradikiĝis.

Nun leviĝas la laboristaro, ĝi ne fidas la tradiciajn normojn kaj komencas memstare esplori. Ĝi konkeras influon en registaroj, popolinstruado; ĝi spertas la maŝinon kaj militon; aeroplanojn kaj atombombojn; sin organizas la junularo; venas filmo kaj radio; malaperas la limoj.

La homo vidas sin antaŭ la produktoj de siaj cerbo kaj instinktoj; ĝi vidas la efikojn bonajn kaj malbonajn. Ĝi konsciiĝas, ke estas la homo mem, kiu difinas la efikon. Ĉu ĝi estas nura krimulo? Iam oni kantis, ke la homo estas bona. Ĉu tio estas grandega mensogo? Ĉu la homo ne povas esti bona? Ĉu ĝi ne plu kapablas krei belaĵojn? Ĉu ĝi estas indiferenta al vero? Ĉu...... Multaj ĉuoj pri la homo. Kaj en nia krizega tempo la homo reiras al si mem kaj konsciiĝas pri si mem.

La psikologio instruas al ni, ke la homo estas ne nur racio, sed ankaŭ instinkto, la pedagogi-scienco montras la vojon, kiel bridi kaj gvidi tiujn energiojn. Jen skeme la historio de la humanismo. Se vi bone observas, vi konstatas, ke en nia tempo ĉiuj formoj kunlaboras en unu direkto. Tial ni povas esperi, ke baldaŭ la tuta mondo en ĉiuj siaj kampoj estos humanismigita. Tiam la homaro estos plenaĝa; tiam ĝi denove sistemigos siajn akiraĝojn kaj ne plu esploros la novajn problemojn. Ĝi eĉ ne plu atentos tiujn problemojn, sed sentos sin feliĉa ĉe konsidero de antaŭaj. La homaro maljuniĝos kaj spirite mortos, same kiel tio okazis en Ĉinio. Kaj kio okazos poste? Ĉu alia raso (eble la nigra) komencos sian grimpadon sur la ŝtuparo de la evoluo? Ĉar parolante pri la homaro ni ja fakte konsideris nur la blankan rason. Ni nenion scias pri la estonteco de l' humanismo, sed ĝi koincidas kun la antaŭhistorio de Ĉinio. Ŝajnas al mi, ke efikas nur unu rimedo por savi la kulturon: ĉiam memstare esplori la problemojn kaj neniam formi el la solvoj dogmojn.

Esperanto estas la humanismigo de la lingvo. La problemo de l' internacia lingvo tute koincidas kun la historio de l' humanismo. Detale priskribi la nuntempan humanismon ne celas mia artikolo. Jen kelkaj branĉoj diverslandaj: en Nederlando „Humanistisch Verbond", „De Dageraad", „Humanitas"; en Francio: Club Maintenant, La Libre Pensée Française; en Anglio: The Ethical Union, The South Place Ethical Society, The Rationalist Press Association; en Usono: American Humanist Association, Ethical Society, Society for Ethical Culture; en Aŭstrio: „Die Ethische Gemeinde"; en Germanio: „Spirita Libero". Krom tio ĉiuj adeptoj de l' Ekzistadismo estas samtempe humanistoj, ĉar la ekzistadismon oni povas nomi pubera formo de l' antropocentra filozofia humanismo.

*Kornelio Bruna.*

---

### Ekstraktoj el „Anatomio de la Paco"

(de Emery Reves)

*Pri la kialoj de tiu publikigo vidu n-on 8/9.*

(p. 64*) La internaciismo, el kiu fontas la komunista filozofio, rapide paliĝis k malaperis por cedi sian lokon al la nacieca komunismo.

(p. 75) En la tuta analizo marksista pri la ŝtato k pri la evoluado de ĉi tiu voje al institucioj pli k pli burokrataj k militistaj, en tiu analizo ne estas unu sola vorto pri la reala kaŭzo de tiu evoluo, nome la naciismo. Ne unu vorto pri la fakto, ke la ŝtato-nacioj estas en konflikto, — konflikto kiu fatale fariĝas milito. Ne unu vorto pri la fakto, ke tiuj militoj inter naciaj unuoj estas kaŭzataj ne de la interna strukturo de la ekonomia k socia sistemo propra je ĉiu el tiuj ŝtatoj-nacioj, sed de tio, ke estas sendependaj k suverenaj unuoj, kies interrilatoj ne estas reguligitaj.

*) Paĝnombro citita laŭ la franca eldono.